



PILO-PRESS

Internacia

Informservo

N-ro 18/1975 14 majo 1975
Aperas ĉiusemajne

Vizitu la librostandon

dum la Germana

Esperanto-

Kongreso en

Oberkirch

=====

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69

60a Universala Kongreso de Esperanto

Sub Alta Protekto de la ĉefministro de Danlando

Kopenhago. (pp/uea) La ĉefministro de Danlando, s-ro Anker Jørgensen, akceptis esti Alta Protektanto de la 60a Universala Kongreso de Esperanto. Mesaĝo de la ĉefministro al la kongresanoj aperos en la Kongresa Libro, kiel kutime.

Honora Komitato formiĝas

Politikaj ŝanĝoj en Danlando malfruigis la formiĝon de Honora Komitato de la 60a UK, sed nun eblas anonci, ke inter ĝiaj anoj troviĝos la ministro pri kulturaj aferoj, Niels Matthiasen; la prezidanto de la dana parlamento, Karl Skytte; la ĉefurbestro de Kopenhago, Urban Hansen; la ĝenerala direktoro de la danaj radio kaj televido, Hans Sölvjög; la urbestro de Frederiksberg, A. Staehr Johansen; kaj la prezidanto de la radia konsilantaro, Jörgen Kleener.

Registaroj invitataj

Ĉiuj landoj, kun kiuj Danlando havas diplomaciajn rilatojn, estas invitataj, pere de la ambasadoj en Kopenhago, oficiale reprezentigi en la Kongreso. Samtempe la prezidanto de UEA sendis inviton al la nova ĝenerala direktoro de UNESKO, s-ro Amadou-Mahtar M'Bow.

Ankaŭ I S U kun nova vizaĝo

En la kadro de la klopodoj "eksperimenti kaj diversigi" rilate la programon de la UK, la Estraro aprobis ankaŭ novstilan programon por la ĉi-jara sesio de la Internacia Somera Universitato, ellaborita de la aganta sekretario de ISU, d-ro Jonathan Pool, en kunlaboro kun internacia komisiono. Kiel ĝis nun, ankaŭ en Kopenhago estos serio de prelegoj (8) por la kongresa publiko fare de profesoroj el diversaj landoj. Sed krom tio, ĉi-jare okazos ankaŭ 8 malgrandaj kunsidoj, al kiuj oni donis la nomon "seminarioj", en kiuj gvidanto-specialisto diskutos pri aparta temo kun granda grupo de interesitaj kongresanoj. Por ĉeesti seminarion, kongresano devos plenigi aliĝpetilon, por kiu aperos modelo en la Kongresa Libro, kaj ricevi permeson de la seminaria profesoro mem. La temaro de la ĉi-jara ISU aparte emfazas diversajn aspektojn de la temo "lingvo". Krome okazos du prelegoj ligitaj al la kongresa temo, la Internacia Jaro de la Virino. Partoprenos entute dekunu profesoroj el naŭ landoj. Krome, nun estas planate instali komputilan terminalon en la kongresejon por la tuta kongressemajno. Ĉe tiu terminalo kongresanoj povos sperti la utiligon de komputilo por instruado de Esperanto kaj pluraj aliaj fakoj.

Alloga dana vespero en preparo

Laŭ la ĝisnunaj intertraktadoj ŝajnas, ke la Dana Vespero en Kopenhago fariĝos unu el la plej variaj kaj altnivelaj de multaj jaroj. Malgraŭ la manko de folkloro kulturo dana, kian posedas la plimulto de aliaj eŭropaj landoj, LKK celas prezenti al la monda publiko sintezon de diverskampaj kulturaj atingoj: modernan teatraĵon,

monologojn, gronlandajn batalkantojn, rakontojn de Andersen kaj la mondfaman pantomiman baledon de Tivoli.

Tivoli - Esperanta renkontiĝejo

La parko-amuzejo Tivoli, amata same de turistoj kiel de Kopenhaganoj, fariĝos renkontiĝejo de esperantistoj en dimanĉo, la 27a de julio. En tiu tago ĉiu kongresano ĝuos tuttagan senpagan enirrajton en Tivoli, montrante nur la kongresan karton.

Speciala kongresa poŝta stampo

La sveda grafikisto Franko Luin, kiu desegnis la emblemon de la 60a UK, preparis ankaŭ la oficialan poŝtan stampon, kiun uzos la PTT-ĝiĉeto en la kongresejo sur ĉiuj poŝtaĵoj en la tagoj 26a de julio ĝis 2a de aŭgusto. Estos havebla ankaŭ speciala unuataga koverto.

Nekontentiga respondo

Wageningen (NL). En PILO-PRESS N-ro 1/1975, p.2/3, estas publikigitaj la demandoj faritaj de la membro C. Laban (Partio de Laboro) de la Eŭropa Parlamento al la Eŭropa Komisiono. La respondo de la 5a de marto 1975 al la demando 616/74 aperis en "Publikatieblad van de Europese Gemeenschappen". Ni publikigas la Esperanto-tradukon, kiun faris el la nederlanda s-ro G. F. Makkink:

"La komisiono nun ne okupas sin en la kadro de sia esploro pri la lingvoinstruado en la Komunaĵo pri la studo de Esperanto kiel ĉia Eŭropa lingvo.

Por pliaj informoj pri la laboroj de la Komisiono sur la kampo de lingvoinstruado la estimata parlamentano estu direktita al la memorando de la Komisiono al la Konsilantaro pri la instruado en la Komunaĵo*, same kiel al la respondo de la Komisiono al la skriba demando n-ro 537/74 de la sinjoro Calewaert**".

* Suplemento al la Bulteno 3/74 p. 12

** Publ. Bl. n-ro C 47 de 27.02.1975 p. 8

Komento de s-ro G. F. Makkink pri la respondo:

Mi rimarkigas ke la Komisiono fakte ne respondis al la faritaj demandoj, ĉar Laban unue demandis "ĉu la Komisiono intencas studi la eblojn por stimuli la instruadon kaj la uzadon de Esperanto". La respondo ne temas pri la intenco. La du aliaj demandoj estas tute ne responditaj. La referenco 1 ne donas respondon ĉar ĝi denove neglektas Esperanton. La referenco 2 ne enhavas koncernajn informojn.

Do estus grave se la diversaj landaj Esperanto-unuiĝoj esprimusian seniluziigon pri la malakurata respondado kaj protestu kontraŭ la neglekto al seriozaj kaj koncernaj demandoj pri akuta problemeno en la Eŭropa Komunaĵo kaj en Eŭropo.

Salutojn el Izraelo

Mondvojaĝanto Adalbert Masuhr sendis salutojn el Tel Avivo, kie li partoprenis al kunveno de Esperantogrupo la 24 aprilo 75. Sur la salutkarto troviĝas multaj subskriboj de izraelaj esperantistoj, i.a. de d-ro Mašler, s-ino Dora Wunderbaum, Frieda Kübel, J. Giladi.

Germana Esperanto-Asocio ofertas novan servon

Münster (pp) Dum sia en marto okazinta estrarkunsido de la estraro de GEA decidis instali novan servon kaj komisiis s-ron Rudolf Fischer pri la fako "letero de leganto".

Kaj ĉar tiu servo necesas detalane klarigon kaj ĉar tiu servo nur povas kontentige funkcii kunlabore kun multaj personoj, permesu al ni priskribon de la laboro de tiu komisiito kaj la teknika aspekto de kunlaboro.

Dum lasta somero refoje montriĝis ke la intereso de amasmedioj pri Esperanto estas granda, sed same ankaŭ evidentiĝis, ke ne ĉiam la de la amasmedioj diskonatigitaj informoj pri la internacia lingvo estas korektaj kaj ankaŭ nepre ne pozitivaj.

Same ofte en radio kaj gazetaro aperas informoj pri lingvaj problemoj, por kiuj nature la internacia lingvo estas la solvo kaj ĉiu aktivulo dezirus respondi al tiaj publikaĵoj. Volonte la gazetoj publikigas respondojn, kondiĉe ke ili estas koncizaj kaj ilia argumentado logika kaj ne emocia.

Estas nun nia intenco reagi al ĉiuj gazetaraj artikoloj, kiuj montras ian rilaton al la internacia lingvo aŭ lingva problemo. Se ni sukcesus kunordigi niajn fortojn ni plej efike povas per "leteroj de legantoj" favore influi la opinion de la publiko pri la internacia lingvo.

Por organizi tian laboron nun necesas du agoj:

ekscio de tiaj artikoloj kaj verkado de responda letero, laŭeble de fakte kompetenta persono.

Ĝuste tion atingi estas la laboro de la nova komisiito. Pro tio ni petas vin pri jenaj kunlaboroj:

Bonvolu sendi regule al la komisiito la eltranĉitajn artikolojn, kiuj laŭ vi estas respondendaj, kun klara indiko de gazeto, eventuale kun ĝia regiona nomo kaj ankaŭ eldontago. Grava helpo ankaŭ estus la aldono de adreso de la redakcio.

La komisiito bezonas densan reton de kunlaborantoj, kiuj estas fakte kompetentaj kaj pretas verki la necesajn respondojn. Ne eblas, ke la komisiito verkas la "leterojn de legantoj", ĉar multe pli verŝajne estas, se ĝuste loke konataj personoj klopodas pri ilia aperigo, ke tiuj leteroj estos publikataj. Pro tio ni petas ĉiujn kunlaborantojn amase anonciĝi ĉe la komisiito. Por faciligi al li la laboron, nepre indiku, pri kiuj kampoj vi kompetentas, se temas pri reago al letero kiu postulas specialajn sciojn. Nura favoro por la internacia lingvo ne sufiĉas!

Kunlaborantoj ricevos ankoraŭ detalajn direktivojn. Pro tio tuj skribu al la komisiito: Rudolf Fischer, 4401 Nordwalde, Gustav-Adolf-Str. 2 a.

Ekspozicio en franca biblioteko

Saint Omer (lgtx) Dum la tuta monato Majo, la urba biblioteko de Saint Omer, Francio, prezentas ekspozicion, lige kun la 70a datreveno de l' Unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo-sur-Mar, 1905. Ilustrita katalogo listigas la librojn, ne-eldonitajn manuskriptojn de d-ro Zamenhof kaj aliajn dokumentojn. Ankaŭ menciindaj estas la afiŝoj, kiuj anoncis la Bulonjan kongreson kaj la gazet-artikoloj de la koncerna jaro. Adreso: Bibliothéque Municipale, 40 Rue Gambetta, F-62500 Saint Omer.

Bonvenon en Oberkirch



La urba halego (Stadthalle) de Oberkirch, la taŭga kongresejo, atendas la partoprenantojn de la 53a Germana Esperanto-Kongreso.

Ankoraŭ estas tempo decidiĝi por veturi al Oberkirch! Oberkirch valoras ankaŭ semajnfinan vojaĝon, eĉ se vi ne aliĝis al la kongreso. Speciale la esperantistoj el najbaraj regionoj povas facile vojaĝi por 1 aŭ 2 tagoj al la urbo en la Nigra Arbaro.

Cetere en la urba halego okazos ankaŭ interesa Esperanto-ekspozicio kaj funkciaj librostando de Libroservo Ludwig Pickel, la 17an kaj 18an de majo.

Krome ni invitas al la kultura vespero, dimanĉe, la 18 majo, je la 20a horo kun prezentado de Esperanto-teatraĵo "Proksima Nekonato".

Esperanto en radio

Varsovio. La lastdimanĉa Esperanto-Ekspreso ankaŭ staris sub la signo de la Jartrideko de la finiĝo de la Dua Mondmilito. Jerzy Grum prezentis pripensindan felieton ĉe-okazan. Por germana aŭskultanto estis speciale interesa la fakto, ke la felietonisto citis frazon el la parolado de federacia prezidento Walter Scheel farita la 6an de majo 1975 en la universitato de Bonn. Certe bona antaŭsigno!

Alia surprizo estis, ke la intervjuo kun Hermann Behrmann okaze de lia unua restado en Pollando laŭ telefona peto de aŭskultantoj estis ripetata. Cetere, la Esperanto-Ekspreso nun estas aŭdebla, kiel Pilo-Press jam anoncis, dimanĉe posttagmeze, vespere kaj lunde matene. Per tio fakte ĉiu aŭskultanto devus havi la eblecon aŭskulti al la plej ŝatata elsendo. Tamen notindas, ke la plej ampleksa Ekspreso okazos dimanĉe vespere, je la 22,30 horo. - En la Esperanto-Anguleto kadre de la germanlingva programo je la 22-a horo Jerzy Grum, la kutima "parolanto en la anguleto" citis el Pilo-Press N-ro 15/75:

Dum la monato aprilo Radio Varsovio ricevis pli ol 400 korespondaĵojn de Esperantistoj. FRG okupis la kvinan lokon!